

Joseph Freiherr von Eichendorff,

## Freŝa veturo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Milde la aero fluas,  
Ja printemp' fariĝu nun!  
Enarbare kornoj bruas.  
Blua helo, brila sun'!

Kaj la vivo plibuntiĝas,  
Iĝas ĝi sovaĝa flu',  
La rivero plilarĝiĝas,  
Kaj min logas plu kaj plu.

Kaj mi volas min ne teni,  
For de vi min pelas vent',  
Kaj mi lasas min fortreni,  
Blinda pro beata sent'.

Voĉoplenas la aero,  
Flame ruĝas la ĉiel',  
Kaj min portas la rivero  
For al nekonata cel'!

*Traduko de la Germana poemo "Frische Fahrt" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (\*1788-03-10 - †1857-11-26) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1993-05-08.*

*MR-257-1d / Arg-60-117 (2003-10-26 00:28:57)*